

Sukavativjuho
aŭ
Libro pri la Lando de Feliĉego

浄土三部経 (抄訳、取意識)

tradukis **Seiho Nishi**, Japanio

Antaŭparolo de la tradukinto

Mi ne estas budaisto, nek apartenas al iu ajn religia sekto. Kiam mi iam havis ŝancon interparoli kun D-ro Saburo Shimazaki, mia kara kolego, li hazarde atentigis min pri la manko de budaisma literaturo en Esperanto. Kelkajn tagojn poste li kunportis al mi japanan, ĉinan kaj sanskritan tekstojn de Sukavativjuho por traduko. Mi atenteme legis ilin kaj kaj povis nun havi iom da scioj pri la fama sutro-trio, kiu jam longe enradikiĝis en la koron de nia popolamaso kaj donis al nia kulturo nemezureble grandan influon. Miaopinie la hindua popolamaso troviĝis tiam plejparte en ekstreme mizera vivkondiĉo, tiel ke Budao ne povis fari alie, ol promesi al ĝi en la nomo de Amidao la feliĉon postmortan. Spite de malkompetenteco mi nun kuraĝis traduki la sutro-trion en Esperanto - blindulo ne timas serpenton - tamen la unuan kaj la duan parton en formo de resumo kaj nur la trian, plej mallongan kaj relative facile tradukeblan en plena formo, ĉar kompleta traduko de la tuta sutraro postulos ne nur ege multe da tempo, sed ankaŭ antaŭ ĉio profundan konon pri la budaismo, kaj estus sekve apenaŭ ebla al la maljuna laiko, kiu ĵus faris la unuan paŝon en la budaismon. Mi do devus esti por momento kontenta, se mi povus per mia fuŝa traduko konigi nebudaistojn, precipe eksterlandajn, pri la konturo de la libro, se ne pri ĝia poezia beleco. Kiel teksto mi ĉefe utiligis Ĵodo-sanbu-kjo de Iwanami-bunko n-roj 6589/94 (1968), afable donacitan de D-ro Shimazaki, kiu krome multe helpis min en la tasko, kaj al kiu mi ĉi tie esprimas mian tutkoran dankon. La sanskritan tekston mi bedaŭrinde ne povis konsulti pro la manko de linga scio. Rilate al la eventualaj eraroj mi petas la legatojn pri iliaj afablaj informoj.

Mi fine rimarkas, ke la sanskritaj vortoj estas en la teksto esperanto-maniere alfabetumitaj kun ŝanĝo aŭ aldono de finaĵoj, kaj la ĉinaj vortoj japan-maniere prononcitaj estas kune kun la japanaj markitaj per asterisko.

Ĝeneralaj terminoj ofte renkontataj en la teksto

Arhato, *arakan* aŭ *rakan*: ulo plej estiminda, kiu liberigis sin de ĉia alligiteco.

Bikŝuo, *biku*: ordinara bonzo.

Bodisatvo, *bosacu*: sanktulo de la plej alta rango, kiu bezonas ankoraŭ unu paŝon por atingi la budacon.

Bucu-lando, *bucu-kokudo*: lando, kiun tatagato regas.

Darmo, *hō*: budaisma principo; leĝo de l' universo, vereco, rezono, kaŭzeco, preskaŭ samsignifa kun greka "logos".

Devao, *ten*: ĉielano

Joĵano, *juĵun*: unuo de longo, ĉ 15km.

Kalpo, *kō*: unuo de tempo, 4,320 jaroj.

Samgo, *sōga*: komunumo de budaanoj, eklezio de Budao. Budao, Darmo kaj Samgo estas 3 subteniloj de la budaismo kaj estas kune nomataj triratno, trezoro-trio, *sanbō*.

Sutro, *kjō*: kolekto de budaismaj aforismoj.

Ŝravako, *ŝōmon*: studanto de la budaismo.

Tatagato, *njorai*: alveninto el la mondo de darmo; darmo enkorpiĝinta.

Kelkaj rimarkoj por nebudaistoj

Budao: Budao¹ estas la fondinto de la budaismo, reformantoro de la hinda prareligio, bramanismo. Li naskiĝis en la 8-a de aprilo de 386 (383?) a.K.² kiel filo de Ŝudodano (Ĵōhannō), reĝo aŭ pliĝuste diktatoro de Kapila-vasto (*Kapira-ĵō*) en Nepalo. Kiam la graveda sinjorino Maha-majo (*Maja-bunin*) volis viziti siajn gepatrojn en Devadaho kaj ripozis survoje sub aŝoka-arbo³ en la Ĝardeno de Lumbino (*Ranbini-on*) li sponte naskiĝis el ŝia dekstra flanko, faris po 7 paŝoj kvardirekten, livis sian dekstran manon cielen kaj laŭte deklaris: Inter ĉielo kaj tero mi estas sole sankta. Post 7 tagoj lia patrino mortis pro akuŝo. Kiam la princo Sidarto (*Sitta-taisi*) atingis la aĝon de 19 jaroj li edziis

¹ Buddha, Budao, estas komuna substantivo kun signifo: sanktulo aŭ vekiĝinto. Nia sanktulo estas nomata laŭ lia klana nomo Gotama-budao aŭ lia genta nomo Ŝakjamunio (munio = sanktulo), aŭ ofte ankaŭ simple Budao. Por eviti konfuzon mi nomas Lin en mia traduko nur Budao kaj aliajn sanktulojn bucuoj (*bucu*).

² Lia naskiĝjaro estas ankoraŭ nedecidita. Kelkaj aŭtoroj metas ĝin en la 5-a aŭ eĉ en la 6-a jc. a.K. Lia naskiĝtago estas ankaŭ necerta; oni diras, ke ĝi respondas al vesako, la tago de la plenlumo en majo.

³ Aŝoka-ĵu, ankaŭ nomata *mujū-ĵu*, sensufero arbo, ĉar ŝia akuŝo okazis sendolore.

al sia kuzino, Jaŝodaro (*Jasudara-hime*), kiu donis al li filon, Rahulo (*Ragora*). Kiam li estis 29 jarojn aĝa, en la 8-a de decembro, li forlasis sian hejmon, kun la celo, liberigi la popol-amason de ĉia surtera sufero⁴. Post longa rigora vivo kaj profunda meditado la 35-jara asketo fine akiris la revelacion sub pipala-arbo⁵ en vilaĝo apud Gajo en Magado, kaj atingis la budacon, liberiginte sin de ĉia surtera alligiteco. Oni poste nomis la vilaĝon Budagajo kaj fondis tie la unuan monakejon nomatan Venuvana-viharo (*Ĉikurin-sôĵa*, monakejo en bambuaro). Post la unua prediko en Mrigadavo (*Rokuja-on*, ĝardeno de cervoj), komencas^[tiel!] lia senfina migrado de misio, akompanate de multaj disĉiploj, tra la nord-orienta parto de Hindio, ĉefe tamen en 2 regnoj, Kosalo kaj Magado en la bazeno de Gango. Kaj dum la migrado, en la 15-a de februaro de 383 a.K.⁶ li finis sian 80-jaran vivon en Kuŝinagaro, trankvile kaj liberigite⁷, sub 4 paroj de ŝala-arboj⁸, kun la kapo norden kaj la vizaĝo okcidenten, ĉirkaŭite de multaj disĉiploj. Al la funebro partoprenis ankaŭ lia patrino jam forpasinta, tiel rakontas la legendo. La kadavro estis kremenciita kaj la cindro (*ŝariro*, *ŝari*) estis distribuita inter 8 gentoj en Hindio. Mi sube mencias la nomon de 10 grandaj disĉiploj, ĉiu kun speciala kapablo: - Ŝariputro (*Ŝarihocu*), eksbramano, mortis pli frue el Budao; Maŭdgaljajano (*Mokkenren*), eksbramano; Kaŝjapo (*Kaŝo*), eksbramano disĉiplo plej konfidita; Anurudo (*Anaricu*), kuzo de Budao, poste blindiĝis; Subuto (*Subodai*), astrologo; Purno (*Huruna*), lerta predikanto; Katjajano (*Kasennen*), eksbramano; Upalo (*Upari*), kortega barbiro; Rahulo (*Ragora*), filo de Budao; Anando (*Anan*), kuzo de Budao.

La vortoj de Budao estis post lia morto kompilitaj ĉefe de Kaŝjapo, Anando kaj Upalo en Raĵagriho.

La idoligita Budao estas akompanata de 2 bodisatvoj: Manĵsri (*Monĵubosacu*), simbolo de intelekto, kaj Samantabadro (*Hugenbosacu*), simbolo de mizerikordo.

⁴ La motivo de lia foriro el la hejmo estis: - Surstrate la juna princo hazarde renkontis kadukulon, malsanulon kaj mortinton sukcesive ^[tiel!], kio faris sur lin profundan impreson pri la efemereco de la homa vivo. En la budaismo oni nomas 4 malfeliĉojn neeviteblajn: naskiĝo(!), maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto.

⁵ *Hippara-ĵu*, figo religiosa, speco de moruso; poste ankaŭ nomata bodidrumo, *bodai-ĵu*, ĉar Budao akiris sub la nomita arbo la budacon, *bodai*; ne identa kun la tilio, kiu estas ankaŭ nomata *bodai-ĵu*.

⁶ Se oni akceptas tiun ĉi daton, oni devas meti lian naskiĝjaron en la 5-a jc. a.K.

⁷ La morton de Budao oni nomas nirvano, *nehan*, stato de absoluta liberiĝo el vivo kaj morto, kiu metas finon al la ĉeno de samsaro, *rinne*, renaskiĝo en alia mondo.

⁸ *Ŝara-ĵu*, giganta arbo, kiu portas hele-flavajn kaj bonodorajn florojn.

Amidao: Amidao⁹ estas fondinto de Sukavato¹⁰. Antaŭ nekalkulebla multaj jaroj vivis potenca reĝo. Li forlasis sian tronon, por servi al la unua tatagato nomata Lokeŝvara-raĵo¹¹ kiel ordinara bikŝuo nomata Darmakalo (*Hôzô-biku*). Post nemezureble longa servado li ĵurpromesis 40 votojn, por savi la homaron el ĝia surtera sufero. Li tiamaniere farigis fine unuaranga tatagato nomata Amidao kaj fondis Sukavaton en nemezureble malproksima Okcidento. Li estas akompanata de 2 bodisatvoj: Avalokiteŝvaro (*Kanzeon-bosacu*), simbolo de mizerikordo, kaj Mahastamaprepto (*Seisi-bosacu*), simbolo de intelekto.

Sukavato kaj Sukavativjuho: Sukavato estas por tiel diri originala verkaĵo de poeto Budao, kiu volis per tio ilustre klarigi sian religian ideon. Amidao estas do nenio alia ol lia idealo personigita, aŭ li mem. La sukavativjuho (*Ĵodo-sanbu-kjô*) estas priskribo pri Sukavato, kaj konsistas kiel dirite el 3 partoj: Granda Amitaja-sutro (*Dai-murjôju-kjô*) estas protokolo de la prediko de Budao en Raĵagriho (*Ôŝa-ĵo*, ĉefurbo de Magado) por Anando kaj Aĵito¹², kaj la dua, Amitaja-djana-sutro (*Kan-murjôju-kjô*) ankaŭ tiu en Raĵagriho por la tragedia reĝino Vaidaho kaj Anando, kaj la tria, Malgranda Amitaja-sutro (*Amida-kjô*), ankaŭ simple nomata Sukavativjuho, tiu en Ŝravasto (*Ŝaei-ĵô*, ĉefurbo de Kosalo) por Ŝariputro. La granda kaj la malgranda sutroj estis eble kompletigitaj en la 2-a jc. p K. ie en varmega regiono de Hindio, dum la meza, kies sanskrita originalo ankoraŭ ne estas trovita, estis publikigita iom pli poste ie en Centra Azio.

⁹ Nia sanktulo posedas 2 alinomojn, Amitabha, *Murjôkô-bucu* (bucuo kun senlima lumo) kaj Amitajus, *Murjôju-bucu* (bucuo kun senfina vivo). Por eviti konfuzon mi intence nomas lin Amidao, *Amida-bucu*.

¹⁰ *Gokuraku* (lando de feliĉego) aŭ *Ĵodo* (nemakulita lando); budaisma erizeo, kiun Amidao regas.

¹¹ *Seĵizai-ô*, identa kun Ŝivao en la bramanismo.

¹² En la sutro Aĵito kaj Maitrejo estas pritraktataj kvazaŭ la sama bucuo. Aĵito estas unu el 16 arhatoj; Maitrejo estas bodisatvo, kiu ekaperos post 5,670 milionoj da jaroj en tiu ĉi mondo, por anstataŭi Budaon.

Granda Amitaja Sutro (Libera resumita traduko)

1. Aŭm!¹³ Mi humile riverencas antaŭ la triratno!

Aŭm! Mi humile riverencas al ĉiuj bodisatvoj kaj ŝravakoj!

Iam Budao restadis kune kun granda samgo konsistanta el 32,000 disĉiploj en Monto Gridrakuto apud Raĵagriho¹⁴. Inter 34 grandaj bodisatvoj troviĝis ankaŭ Anando, kiu ankoraŭ bezonis pluan studadon. Al li Budao predikis jene:

2. La tatagatoj aperas en tiu ĉi mondo ekstreme malofte, same kiel la udumbaro¹⁵ portas florojn.

3. Antaŭ nekalkuleble multaj kalpoj aperis sinsekve 81 tatgagatoj. La nua estis nomata Lokeŝvara-raĵo. Inter multaj liaj disĉiploj troviĝis bikŝuo nomata Darmakalo, *Hôzô-biku*.

4. Li humile riverencis antaŭ sia Majstro kaj recitis psalmon konsistantan el 10 versoj,

5. kaj promesis al sia Majstro, ke li nepre plenumu ĉiujn kondiĉojn bezonatajn por fariĝi tatagato. Lia Majstro klarigis al li dum cent milionoj da jaroj la admirinan aspekton de sennombraj bucu-landoj.

6. Kiam Darmakalo plene komprenis lian klarigon, li humile riverencis antaŭ li kaj metis liajn ambaŭ piedojn sur sian kapon.

7. Li nun decidis fondi novan bucu-landon 81-oble pli belan ol la ĝisnunaj,

8. kaj li ĵurpromesis 49 votojn.

9. Li esprimis sian sopiron per psalmo konsistanta el 12 versoj,

10. kaj tiamaniere li sendifekte plenumis ĉiujn necesajn kondiĉojn.

11. Budao daŭrigis sian predikon: - Li ne forpasis, nek ankoraŭ aperas, sed eĉ nun vivas en la lando nomata Sukavato, kiu troviĝas en Okcidento nemezureble malproksima.

12. Li estas nomata Amitabo, ĉar lia lumo atingas nekalkuleble multajn joĵanojn malproksimen, kaj lumigas ĉiujn bucu-landojn sennombrajn kiel sableroj de Gango. Liajn bonfarojn oni ne povas finklarigi, eĉ se oni senĉese rakontus ilin dum unu kalpo.

13. La nombro de liaj disĉiploj estas ankaŭ nekalkulebla, tiel ke milionoj da bucuoj kiel Maha-maŭdgaljajano, kiu povas kalkuli la tutan nombron de steloj en unu nokto, ne povas kalkuli eĉ ĝian milonon, eĉ se ili senĉese kalkulus ĝin dum milionoj da jaroj; ĝi estas komparebla kun la nombro de gutoj elĉerptataj el oceano per la pinto de haro centone splitigita.

¹³ Sorĉa vorto, kiu laŭdas 3 naturajn potencojn: kreado, konservado kaj detruado, reprezentataj de 3 bramanismaj dioj: Bramo, Viŝnuo kaj Ŝivao (*Bon-ten*, *Biĉu-ten* kaj *Siba-ten*), la kredanto, konservanto kaj detruanto de la universo.

¹⁴ *Kiŝakucu-sen*, Monto de Sakta Aglo, apud *Ŝaei-ĵo*.

¹⁵ *Udonge*, floro de legenda arbo, kiu floras en ciklo de 3000 jaroj unu fojon.

14. La vivo de Amitabo estas nemezureble longa; li estas tial ankaŭ nomata Amitajo: li travivis jam 10 kalpojn, ĝis kiam li akiris la ĝustan kredon ĉe Lokeŝvara-raĵo.

15. En Sukavato ĉio estas prospera, ĉio abunda, ĉio pitoreska. Tie troviĝas nenio infera, nenio besteca, nenio netaŭga por Amidao.

16. Ĉiuj kreskaĵoj konsistas el juveloj. Gigantaj lotuso-floroj¹⁶ el juveloj eligas sennombrajn lumradiojn, sur kiuj sidas sennombraj bucuoj orkoloraj, kaj senĉese predikas al sennombraj loĝantoj en sennombraj bucu-landoj.

17. Ĉiuj montoj konsistas ankaŭ el juveloj.

18. En ĉiuj riveroj fluas bonodora akvo, kiu sursuretas per ĉarma melodio, kaj en kiu oni povas laŭvole ĝui agrablan banadon. Ĉie bonodoras belaj floroj; ĉie aŭdigas dolĉaj kantoj de birdoj.

19. Kiu jam naskiĝis, aŭ nun naskiĝas, aŭ iam naskiĝos en Sukavato, povas senescepte ĝui tian feliĉan vivon.

20. Tie ekzistas nenia diskriminacio inter homoj kaj ĉielanoj.

21. Tie ĉiuspecaj floroj disfalas per brizoj kaj disŝutas ĉien bonodoron.

22. Tie oni bezonas nenion fari ol observi la farojn de tatagatoj.

23. Sur la ĉielo ŝvebas la nuboj de parfumo; tie dancas ĉielaninoj agorde kun ĉiela muziko.

24. Kiu ajn naskiĝis aŭ naskiĝas aŭ naskiĝos en Sukavato, vivas pace kaj libere; ĝi estas tial nomata Lando de Feliĉego.

25. Kaj Budao admire laŭdis Sukavaton per recitado de psalmo konsistanta el 5 versoj.

26. Sennombraj estas la bucuoj kaj bucu-landoj same kiel la sableroj de Gango; ili ĉiuj admire laŭdas Amidaon, ĉar ĉiuj kredantoj de Amidao neniam deturnas sin de sia kredo.

27. Troviĝas 3 kladoj de homoj, kiuj deziras renaskiĝon en Sukavato. Kiam unuaklasano mortos, Amidao mem ekaperas antaŭ li, kaj li mortas trankvile kaj renaskiĝos en Sukavato.¹⁷

28. Kiam duaklasano mortos, anstataŭulo ekaperas en formo de Amidao antaŭ li, kaj li ankaŭ mortas trankvile kaj renaskiĝos en Sukavato.

¹⁶ *Renge*, floro de *Nelumbo nucifera*, la simbolfloro de la budaismo, apartenas tamen al la speco de nimfeo.

¹⁷ *Raikô* = veni kaj akcepti; bonvenigi, *Ooĵo* = iri kaj naskiĝi, renaskiĝi en Sukavato. Nesavitaj aninoj senfine transmigradas 6 mondojn aŭ vojojn unu post alia: infera (*jigoku-dô*), malsatula (*gaki-dô*), besta (*ĉikuŝô-dô*), asura (*ŝura-dô*), hoa (*ningen-dô*) kaj ĉiela (*ten-dô*), ĝis ili finfine savite akceptataj en Sukavato. Tiun ĉi rondmigradon oni nomas samsaro, *rinne* (metempsikozo).

29. Kiam traiaklasano mortos, Amidao ekaperas en lia sonĝo, kaj li ankaŭ mortas trakvile kaj renaskiĝos en Sukavato.

30. Sennombraj estas la bucuoj en aliaj bucu-landoj; ili vizitas Sukavaton, por riverenci antaŭ Amidao.

31. Budao nun recitis psalmon konsistantan el 21 versoj, por pli detale klarkigi pri la renaskiĝo.

32. Li krome admire laŭdis la mirindan efikon de giganta pipala-arbo 1600 joĝanojn alta en Sukavato. Ĝi protektas la korpon kaj menson de ĉiuj sukavatanoj kontraŭ ĉiuspecaj malordoj.

33. Ĉiuj bodisatvoj, kiuj jam naskiĝis aŭ nun naskiĝas aŭ iam naskiĝos en Sukavato, estas [tiel!] nur unu fojon vivis aŭ vivas aŭ vivos en tiu ĉi aktuala mondo, kaj neniam refoje naskiĝos en ĝi.

34. En Sukavato ĉiuj ŝravakoj dissendas lumon kaj lmigas 1 klafton ĉirkaŭ si; ĉiuj bodisatvoj lumigas 100 joĝanojn, escepte de 2 eminentaj bodisatvoj, Avalokiteŝvaro kaj Maha-stamaprapto, kiuj lumigas ĉiujn bucu-landojn senescepte per sia propra lumo.

35. Ĉiuj bodisatvoj posedas perfektan korpon kaj stabilan menson kun intelekto kaj virto senlimaj.

36. Ĉiuj bodisatvoj ne refoje naskiĝos en tiu ĉi aktuala mondo, escepte de tiaj, kiuj, same kiel Budao mem, propravole restadas en ĝi, por savi la popolamason el 5 malpuroj¹⁸.

37. Kiam la bodisatvoj en Sukavato volas servi la tatagatojn de aliaj bucu-landoj per floroj aŭ per aliaj oferaĵoj, la aĵoj deziritaj subite ekaperas en iliaj manoj, kaj la floroj disŝutitaj super ilin ŝanĝas sin en ĉielajn florbaldakenojn.

38. Budao nun detale priskribas al Anando la virteman karakteron de bodisatvoj.¹⁹

39. Budao nun ordonas al Anando, adorklini sin kontraŭ Okcidento, kie Amidao loĝas. Jen subite ekaperas Amidao antaŭ Anando, kaj ĉiuj bucu-landoj dronis en la lumegon disradiantan el lia polmo, kvazaŭ en la superfluegon ĉe la fino de la mondo. Ĉiuj sukavatanoj vidis ankaŭ Budaon predikanta ĉirkaŭite de multaj disĉiploj.

40. Kaj Budao nun demandis Aĵiton, ĉu li ankaŭ vidis Sukavaton.

41. Estas 2 specoj de renaskiĝintoj en Sukavato: la unuj loĝas en lotusaj florburĝonoj, ĉar ili kun suspekto renaskiĝis en Sukavato; la aliaj sidas sur kruigitaj kruroj sur lotusaj floroj, ĉar ili dekomence firme kredas Amidaon. Supozu iun princon, kiu estas

¹⁸ aŭ 5 malfeliĉoj, *goĝoku*; ĉiuspecaj akcidentoj, disvastiĝo de maljustaj ideoj, plifortiĝo de vivdeziroj, malfortiĝo de korpo kaj animo, mallongiĝo de la vivo.

¹⁹ En la ĉina teksto sekvas ĉi tie longa prediko de Budao al Matrejo, ĉielanoj kaj homoj, kiamaniere oni povas naskiĝi en Sukavato kaj kiamaniere oni povas eviti la 5 malpurojn.

enkarcerigita en malliberejo sendifekte ekipita. Ĉu li estas malgraŭ tio feliĉa? Oni devas do kun firma kredo klopodi por renaskiĝi en Sukavato.

42. Kiu ajn ne suspektas, povas renaskiĝi en Sukavato. La nombro de transloĝantoj el aliaj bucu-landoj estas nekalkuleble granda. Mi ĉi tie mencias nur la nomojn de 15 tatagatoj, el kies landoj la loĝantoj amase transloĝiĝos en Sukavaton.

43. Mi do decideme konsilas al ĉiuj ĉielanoj kaj homoj, ke ili nepre aŭskultu ĉi tiun predikon, ĉar ĝi certe alportos al ili nemezureble grandan feliĉon. Antaŭen Aĵito! por ke nia instruo ne perdiĝu!

44. Kaj Budao recitis psalmon konsistantan el 10 versoj.

45. Nekalkuleble multaj homoj, ŝravakoj kaj bodisatvoj estis tiamaniere liberigitaj kaj maturigitaj de Amidao.

46. Tiam subite ekaperis aŭguroj: la tero tremis, madaravaj floroj²⁰ kovris la teron, kaj muziko aŭdiĝis en la ĉielo.

47. Kaj Budao finis la predikon. Ĉiuj aŭskultantoj, bodisatvoj, Aĵito, Anando, ĉielanoj, homoj, asuroj, garudoj, gandarvoj²¹ ktp. ĝojege aplaŭdis.

²⁰ *Mandara-ge*, fantazia floro en Ĉielo; ne identa kun daturo japane samnomita.

²¹ La 3 lastaj apartenas al la t.n. 8 heterodoksanoj: Devao (*daiva*, diaĵo en Ĉielo), Nagao (diaĵo de drako), Jakŝo (*jaŝa*, furioza demono), Gandarvo (*kendappa*, diaĵo de kanto), Asuro (*aŝura*, furioza diaĵo), Garudo (*karuna*, fabela birdego), Kimnaro (*kinnnara*, diaĵo de muziko) kaj Mahorago (*maĝoraka*, diaĵo de boao).

Amitaja-djana-sutro (Libera resumita traduko)

Iam Budao restadis en Monto Gridrakuto apud Raĵagriho, akompanate de 1250 ŝravakoj kaj 32000 disĉiploj gvidataj de Manĵuŝro. Ĝuste tiam vivis en Raĵaghiro princo nomata Aĵataŝatro²², kiu instigite de malbona amiko nomata Devadaho²³, enkarcerigis sian patron, Reĝo Bimbisaro; Sinjorino Vaidaho²⁴ sekrete nutradis la reĝon, kaj la ofendita princo volis do mortigi ankaŭ sian patrinon. Ministro Ĉandrapradivo (Luna Lumo) kaj kortega kuracisto Ĵivako²⁵ malhelpis al la princo la agon kaj diris; Ekzistis jam 18000 princoj, kiuj murdis sian patron pro tronheredo, sed ĝis nun neniu murdis sian patrinon. La princo do enkarcerigis ŝin ankaŭ. Ŝi tamen petis Budaon, ke li sendu al ŝi Maŭdgalĵananon kaj Anandon por konsoli ŝin. Neatendite ekaperis tamen Budao mem akompanate de ambaŭ bodisatvoj antaŭ la sinjorino, kiu petis lin por helpi al ŝi la fuĝon el tiu ĉi malbenita mondo. Budao eligis tiam lumradiojn el sia glabelo, por montri ke li diversajn bucu-landojn^[tiel!]. Ŝi do deziris la renaskiĝon en Sukavato kaj la vivon sub la protekto de Amidao. Budao nun eligis kvinkolorajn lumradiojn el sia buŝo, kaj la reĝo ankaŭ decidis, neniam refoje naskiĝi en tiu ĉi mondo.

Budao nun klarigis al la reĝino, kiamaniere oni povu havi imagon pri Sukavato kaj pri Amidao, kaj por havi imagon pri Sukavato li rekomendis al ŝi 6 rimedojn: 1-e, profunde mediti pri la suno malleviĝanta²⁶; 2-e, pri la akvo de Sukavato; 3-e, pri la tero de Sukavato; 4-e pri la arbaro de Sukavato; 5-e, pri la lago de Sukavato, kaj 6-e, pri Sukavato entute. Kaj por hai imagon pri Amidao, li rekomendis al ŝi pluajn 7 rimedojn: 7-e, profunde mediti pri la sidejo sur lotus-floro; 8-e, pri Amidao kaj liaj ambaŭ akompanantoj sur lotus-floroj; 9-e, pri la trajto de Amidao kun karakteriza vortiko de blankaj haroj ĉe la glabelo; 10-e, pri la trajto de Avalokiteŝvaro; 11-a, pri tiu de Mahastamaprapto; 12-e, imagi kvazaŭ troviĝi en Sukavato, kaj 13-e, imagi pri la ĉiutaga vivo de Amidao kaj ambaŭ bodisatvoj en Sukavato.

²² *Aĵase-ô*; renaskiĝinto de iu emerito, kiun lia patro mortigis en la pasinta mondo. Por malebligi lian venĝon liaj gepatroj planis mortigi la novnaskitan princon. Tio estas la kaŭzo, kial li estas malafabla kontraŭ siaj gepatroj.

²³ *Daiba-datta*, kuzo de Budao.

²⁴ aŭ *Vedeĥo*, *Ikaike-bunin*.

²⁵ *Giba*; fama kortega kuracisto, kiu studis grekan medicinon. Oni diras, ke li praktikas katalaktan operacion kaj eĉ cezarean tranĉon (elpreno de matura fetto per lapartomio). Budao mem ricevis ankaŭ lian kuracadon.

²⁶ Okcidenten, kie Amidao loĝas.

Budao plue klarigis al Anando kaj Vaidaho, kiamaniere oni povas renaskigi en Sukavato: La homoj estas divideblaj en 3 klasojn: superan, mezan kaj malsuperan, kaj la renaskiĝo en Sukavato okazas ankaŭ responde en 3 manieroj; ĉiu klaso estas plue dividedbla en 3 subklasojn, tiel ke la homoj estas akceptataj en Sukavato entute per 9 manieroj. La unuaklasa kredanto estas kompreneble senkondiĉe bonvenigata de Amidao, dume eĉ la naŭaklasa fripono povos trovi sian sidejon en lotusoflora burĝono, se li ĉe la morto ripete recitadas la nomon de Amidao; kaj la burĝono floros post 12 kalpoj, kaj li estos tiamaniere ankaŭ fine savata.

Aŭskultante tion la reĝino kaj 500 koreteganinoj petegis Budaon, ke li helpu al ili la renaskiĝon en Sukavato, kaj Budao promesis, ke ilia deziro estu nepre plenumota.

Responde al la demando de Anando Budao proponis, ke tiu ĉi sutro estu nomata "Sutro por vidi Sukavaton kaj Amidaon", kaj plue aldonis, ke amabaŭ bodisatvoj, Avalotiteŝvaro kaj Maha-stamaprapto, estu ĉiam bonaj amikoj por la preĝantoj de Amidao. Maŭdgaljajano, Anando, Vaidaho kaj ĉiuj ĉeestantoj humile riverencis kun ĝojego antaŭ Budao, kiu intertempe revenis al Gridrakuto tretante la nubon.

Amida-sutro (Plena traduko)

Antaŭ ĉiuj tatagatoj kaj bodisatvoj mi riverencas.

1. Tiel mi aŭdis: Iam Budho restadis kune kun 1250 disĉiploj en Ĵetavano apud Ŝravasto²⁷, ĝardeno de iu bonfaranto²⁸, kiu volonte alimentis senhelpulojn. Ili estis ĉiuj eminentaj arhatoj, kiuj posedas supernaturajn kapablojn. Ili estis nome: Senioro Ŝariputra, Maha-maŭdgaljajano, Maha-kapino, Maha-katjajano, Maha-kaŭstiljo²⁹, Revato³⁰, Ŝudipantako³¹, Nando³², Anando, Rahulo, Gavampato³³, Varadvaĵo³⁴, Kalodajno³⁵, Vakulo³⁶, Anirudo kaj multaj eminentaj ŝravakoj; multaj bodisatvoj kiel Manĵuŝri-kamarabuto, Aĵita-bodisato, Gandahastin-bodisatvo, Nitjodjukta-bodisatvo, Anikasiptadura-bodisatvo, krome Ŝakro³⁷, reĝo de dioj, Bramo³⁸, mastro de la reala mondo, kaj multege da ĉielanoj.

2. Tiam Budao diris al Ŝariputro: Nun, Ŝariputro! Okcidente trans nekalkuleble mutaj bucu-landoj troviĝas lando nomata Sukavato, Lando de Feliĉego. Tie vivas eĉ nun tatagato nomata Amitaĵo, Tatagato kun senfina vivo, alte estiminda, vere vekiĝinta, kaj predikas ĉiutage. Nun Ŝariputro! Ĉu vi scias, kiel tiu ĉi lando estas nomata Sukavato?

²⁷ Ĝardeno de Princo Ĵetao, *Ĝida-rin* aŭ *Gi-on* apur *Ŝae-ĵo*, ĉefurbo de Kosalo.

²⁸ Nomata Sudato, *Sudatta*, kiu pste fondis tie monakejon, Ĵetavana-viharo, *Gion-sôĵa*.

²⁹ *Kuĉira*, onklo de Ŝariputro.

³⁰ *Rihata*, frato de Ŝariputro.

³¹ *Handoku*, denaska stultulo, edukita de Budao.

³² *Nanda*, nevo de Maha-majo.

³³ *Kjôbonhadai*, renaskiĝinto de bovo, bruligis sin ĉe la morto de Budao.

³⁴ Pindolo, *Binzuru*, bucuo tre familiara ĉe ni.

³⁵ *Karudain*, renaskiĝinto de bovo, bruligis sin ĉe la morto de Budao.

³⁶ *Hakura*, vivis 160 jarojn.

³⁷ *Taiŝaku-ten*. Ankaŭ omata Indro. Hindio diigita, plej potenca dio en la bramanismo; en la budaismo li servas al ĝi kune kun Bramo kaj aliaj dioj kiel ĝia gardisto. Ĉiuj dioj loĝas aparte sur la pinto de Sumero, *Ŝumi-sen*, fantazia montego en la centro de la universo, kaj kune regas Ĉielon.

³⁸ *Bon-ten*. Vd. 13 k 37.

3. Nun Ŝariputro! Sukavato estas ĉirkaŭita per sepoblaj ŝtonmuroj, sepoblaj aleoj de tala-arboj³⁹ kaj sepoblaj retoj kun tintiloj. Ili ĉiuj estas ornamitaj per 4 specoj de juveloj: oro, arĝento, safiroj kaj kristaloj, kaj brilas bele kaj pompe! Nun Ŝariputro! Ĝi estas tiamaniere aranĝita konvene al bucu-lando.

4. Nun Ŝariputro! En Sukavato troviĝas lotusa lago borderita per 7 specoj de juveloj: oro, arĝento, safiroj, kristaloj, koraloj, agatoj kaj sukcennoj. La akvo kun 8 karakterizaĵoj⁴⁰ plenplenigas la lagon ĝis la bordo, tiel ke la korvoj povas facile trinki akvon el la lago. La fundo de la lago estas kovrita per ora sablo. Ĉe ĝiaj kvar flankoj, troviĝas 4 ŝtuparoj konstruitaj po el oro, arĝento, safiroj kaj kristaloj. Ĉirkaŭ la lago kreskas arboj el 7 specoj de juveloj: oro, arĝento, safiroj, kristaloj, koraloj, agatoj kaj sukcennoj. En la lago floras rado-grandaj lotus-floroj diverskoloraj: bluaj, flavaj, ruĝaj kaj blankaj, ĉiuj kun diversaj briloj kaj ombroj. Nun Ŝariputro! Sukavato estas tiamaniere aranĝita konvena al bucu-lando.

5. Nun Ŝariputro! En Sukavato aŭdiĝas ĉiam ĉiela muziko. Orkolora estas la tero, sur kiu la floroj de mandaravoj falas 3 fojojn nokte kaj 3 fojojn tage. Kiu naskiĝis en Sukavato, vizitas antaŭ la matenmanĝo aliajn bucu-landojn, por riverenci antaŭ ĉiuj bucuoj kaj por disŝuti florojn super ĉiujn tatagatojn, kaj revenas hejmen por ripozi kaj bucuservi. Nun Ŝariputro! Sukavato estas tiamaniere aranĝita konvene al bucu-lando.

6. Nun Ŝariputro! En Sukavato loĝas cignoj, numeroj, pavioj kaj aliaj kantobirdoj⁴¹. Ili aŭ ĥore aŭ sole kantas 3 fojojn nokte kaj 3 fojojn tage. Iliaj kantoj predikas la kondiĉojn necesajn por atingi la ĝustan kredon. Aŭskultante iliajn kantojn la loĝantoj de Sukavato sponte preĝas en koro al Budao, al Darmono kaj al Samgo. Nun Ŝariputro! Ili ne estas birdoj aliformiĝintaj pro antaŭnaskaj pekoj, sed estas birdoj senditaj de Amidao, por propagandi Darmon. Nun Ŝariputro! Sukavato estas tiamaniere aranĝita konvene al bucu-lando.

7. Nu, Ŝariputro! En Sukavato aŭdiĝas ĉiam ĉarma muziko, kvazaŭ ĉielanoj koncertas per sennombraj muzikiloj, kiam la aleoj de tala-arboj kaj la retoj kun tintiloj ŝanceliĝas pro brizoj. Aŭskultante la muzikon la loĝantoj de Sukavato sponte preĝas en koro al Bucuo, al Darmono kaj al Samgo. Ho, Ŝariputro! Sukavato estas tiamaniere aranĝita konvene al bucu-lando.

8. Nu, Ŝariputro! Ĉu vi scias, kial tiu ĉi tatagato estas nomata Amitaĵo? Ĉar la loĝantoj de Sukavato senescepte vivas nemezureble longan tempon. Krome, jam pasis 10 kalpoj, depost kiam Amidao akiris la ĝustan kredon.

³⁹ *Tara-ĵu*, speco de palmo; oni utiligis ĝiajn foliojn por skribi sutrojn per stileto.

⁴⁰ *dolĉa*, milda, klara, senodora, malvarma, refreŝiga, saniga, kaj nutra.

⁴¹ La ĉina teksto mencias krome kelkajn pluajn kantobirdojn, el kiuj kalavinko, *karjōbinga* kun vizaĝo de belulino estas fame konata.

9. Nu, Ŝariputro! Ĉu vi scias, kial tiu ĉi tatagato estas nomata Amitabo? Oni nomas lin Amitabo, ĉar li senlime lumigas ĉiujn bucu-landojn. Krome, ho, Ŝariputro! Sennombraj estas la ŝravakoj, kiuj studas ĉe li; sennombraj estas ankaŭ la alte estimindaj arhatoj. Ho Ŝariputro! Sukavato estas tiamaniere aranĝita konvene al bucu-lando.

10. Nu, Ŝariputro! Kiuj jam naskiĝis kaj nun vivas en la Lando de Amidao, fariĝos iam bodisatvoj, ĉar ili neniam retiriĝos de sia kredo, kaj studante Darmon ili vivos nur unu fojon en tiu ĉi mondo. La nombro de la loĝantoj de Sukavato fariĝos tial nekalkuleble granda. Ĉiuj homoj deziru do naskiĝi en la bucu-lando, ĉar ili povas tie renkonti tiajn eminentulojn. Oni tamen atentu, ho Ŝariputro, ke oni ne povas facile naskiĝi en la bucu-lando per etaj bonfaroj. Nu, Ŝariputro! Kiam piaj viroj kaj virinoj⁴² aŭskultas la nomon de Amidao kaj senĉese meditadas dum unu nokto, aŭ 2 aŭ 3 aŭ 4 aŭ 5 aŭ 6 aŭ 7 noktoj pri Amidao. Li ekaperos ĉe la morto, akompanate de ŝravakoj kaj kondukate de bodisatvoj, kaj ili tiamaniere povos morti sentime kaj trankvile, kaj renaskiĝos en Sukavato, Lando de Amidao. Ĉar mi firme kredas tion, mi rekomendas al ĉiuj piaj viroj kaj virinoj, ke ili nepre deziru renaskiĝi en la Lando de Amidao.

11. Nu, Ŝariputro! Same kiel Amidao en Okcidento, kies mirindan virton mi ĵus admire priskribis, vivas ankaŭ en Oriento multaj tatagatoj nomataj: Akŝobjo⁴³, Meru-dvaĵo, Maha-meruo, Meru-pravaso, Manĵu-dvaĵo, k.a. Gvidate de ili la bucuoj en Oriento, sennombraj kiel sableroj de Gango klare deklaras, kovrante siajn landojn per langoj larĝaj kaj longaj⁴⁴: KREDU ĉi tiun sutron, kiu laŭde priskribas la mirindan virton de Amidao, kaj kiu estas protektata de ĉiuj bucuoj.

12. Same ankaŭ en Sudo vivas multaj tatagatoj nomataj: Ĉandra-surjapradibo, Jaso-pravo, Maha-arĉiskando⁴⁵, Meru-pradibo, Ananta-virjo, k.a. Nu, Ŝariputro! Gvidate de ili la bucuoj en Sudo, sennombraj kiel sableroj de Gango klare deklaras, kovrante siajn landojn per langoj larĝaj kaj longaj: KREDU ĉi tiun sutron, ktp.

13. Same ankaŭ en Okcidento vivas multaj tatagatoj nomataj: Amita-skando, Amita-dvaĵo, Maha-prabo, Maha-ratna-ketuo, Ŝuda-Taŝmi-prabo, ktp. Nu, Ŝariputro! Gvidate de ili la bucuoj en Okcidento, sennombraj kiel sableroj de Gango klare deklaras, kovrante siajn landojn per langoj larĝaj kaj longaj: KREDU ĉi tiun sutron, ktp.

⁴² *Zennan-zenniĵo*.

⁴³ *Aŝuku-bucu*, kun signifo: senmova, apacia. Li fariĝis tatagato, subigante ĉian vivdeziron, precipe la pasion de kolero. La multaj sekvantaj bucuoj ne estas tre popularaj; ili havas diversajn imponajn nomojn, ekzemple: Meru-dvaĵo = Standardo de Sumero, ktp.

⁴⁴ Unu el la korpaj karakterizaĵoj de la tatagato. La frazo signifas: kun fidindaj vortoj.

⁴⁵ La samnomita tatagato troviĝas kroe en Nordo kaj Supro.

14. Same ankaŭ en Nordo vivas multaj tatagatoj nomataj: Maha-arĉiskando, Vaiŝvanara-goŝo, Dundubi-svara-nirgoŝo, Duŝpradarŝo, Aditja-sambavo, Ĵaleni-prabo, Praba-karo, k.a. Nu, Ŝariputro! Gvidate de ili la bucuoj en Nordo, sennombraj kiel sableroj de Gango klare deklaras, kovrante siajn landojn per langoj larĝaj kaj longaj: KREDU ĉi tiun sutron, kiu laŭde priskribas la mirindan virton de Amidao, kaj kiu estas protektata de ĉiuj bucuoj.

15. Same ankaŭ en Malsupro vivas multaj tatagatoj nomataj: Simho, Jaŝaso Jaŝa-prabaso, Darma, Darma-daro, Darma-dvaĵo, k.a.. Nu, Ŝariputro! Gvidate de ili la bucuoj en Malsupro, sennombraj kiel sableroj de Gango klare deklaras, kovrante siajn landojn per langoj larĝaj kaj longaj: KREDU ĉi tiun sutron, ktp.

16. Same ankaŭ en Supro vivas multaj tatagatoj nomataj: Brama-goŝo, Naksatro-raĵo, Indra-ketu-dvaĵa-raĵo, Gandaŭtumato, Gandaprabzaso, Mahaarĉiskando, Ratnakusuma-sampŝpita-gatro, Salendara-raĵo, Ratnot-paraŝro, Sarvarta-darŝo, Sumeru-kalpo, k.a. Nu, Ŝariputro! Gvidate de ili la bucuoj en Supro, sennombraj kiel sableroj de Gango klare deklaras, kovrante siajn landojn per langoj larĝaj kaj longaj: KREDU ĉi tiun sutron, ktp.

17. Nu, Ŝariputro! Ĉu vi scias, kial tiu ĉi sutro estas nomata: Sutro protektata de ĉiuj bucuoj? Ĉar piaj viroj kaj virinoj, kiu iam aŭdis kaj memoras kaj neniam forgesas la nomon de Amidao kaj tiun de la sutro, estos senescepte protektataj de bucuoj, kaj neniam retiriĝos de la ĝusta kredo. Nu, Ŝariputro! Vi ĉiuj kREDU kaj akceptu ĉion, kion mi kaj ĉiuj bucuoj predikas, kaj ne dubu! Aŭskultu, ho, Ŝariputro! Ĉiuj piaj viroj kaj virinoj, kiuj iam ĵuros, aŭ jam ĵuris aŭ nun juras pri la renaskiĝo en la Lando de Amidao, kaj ne retiriĝas de la ĝusta kredo, nepre naskiĝos iam aŭ naskiĝis jam aŭ naskiĝas nun en la Lando de Amidao. Tial, ho, Ŝariputro! Ĉiuj piaj viroj kaj virinoj devu nepre ĵurpromesi kun firma kredo la renaskiĝon en la Lando de Amidao.

18. Nu, Ŝariputro! Same kiel mi admire laŭdas la mirindan virton de la tatagatoj, ili ankaŭ admire laŭdas vian [tiel! mian?] mirindan virton kaj diras: Vi Sanktulo de Ŝakjagento, Reĝo de Ŝakjagento! Vi elfaris la ekstreme malfacilan taskon. Akirinte la absolute ĝustan kredon en tiu ĉi aktuala mondo, Vi predikis meze en la 5 malpuroj Darmon, malfacile akcepteblan de la popolamaso.

19. Nu, Ŝariputro! Estis ankaŭ al mi ekstreme malfacila tasko, akiri la absolute ĝustan kredon en tiu ĉi aktuala mondo kaj prediki meze en la 5 malpuroj Darmon malfacile akcepteblan de la popolamaso.

20. Tiel predikis nia Majstro. Ŝariputro, kiel ankaŭ ĉiuj ŝravakoj, bodisatvoj, ĉielanoj, homoj, asuroj, gandarvoj kaj ĉiuj aliaj ĉeestantoj, aŭskultis Lian predikon kun ĝojego kaj humile riverencis.

Fino de Mahajana Sutro⁴⁶
nomata: Spektaklo feliĉega kaj belega.

⁴⁶ *Daiĵô-kjô*. La budaismo estas dividebla en 2 grandajn sektojn: mahajana, *daiĵô* kaj hinajana, *ŝôĵô*. La unua signifas grandan veturilon, omnibuson, kiu transportas plurajn homojn amase; ĝi celas la savadon de la popolamaso. La hinajano estas malgranda veturilo por unuopaj personoj, kaj celas la perfektigon de la individuo.